

Literatura Mondo, 3-a parto: Libroj aĉeteblaj en 1924,
literatura reviviĝo, skeĉo de Raymond Schwartz
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 629, 1975.10.29 & 11.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la aŭtunaj monatoj ni trafolumos kun vi la epokfaran revuon **Literatura Mondo**.

A.- En novembro 1924, tio estas en la dekunua numero de la tria jaro de **Literatura Mondo**, Raymond Schwartz de la Verda Kato, sub la titolo **Literatura reviviĝo**, verkis skeĉon, kiu listigas la librojn tiam aĉeteblajn en la Pariza 'Centra Librejo Esperantista'. Estas interese citadi tiun ĉi tekston, kiu donas bonan ideon pri la verkoj jam aperintaj, kiam **Literatura Mondo** komencis ekinflui la esperanto-aŭtorojn kaj la legeman publikon.

Cl.- « ... Kaj tiu ĉi Librejo, la « Centra » laŭ difino,
Fariĝas ĉiunokte sorĉregno de feino.
Dum tag', - mi tion scias, - en paco kaj silento
Sub ŝirma polv-tavolo de jam kvaron-jarcento
Ripozas sur la bretoj, laŭlonge de l' kvar muroj,
Binditaj belaj libroj najbare kun broŝuroj
Kaj sen reklama bruoj, samkiel Esperanto,
Atendas eblan venon de ebla aĉetanto...

Noktmeza hor' sonoris. Ankoraŭ ĝiaj vibroj
Akorde kaj signale tremetas sur la libroj
Kaj jam de ĉiuj partoj, de l' planko ĝis plafono,
Tra ĉiuj librofakoj laŭtiĝas flustra tono,
Kar sorĉe enkorpiĝas klasike famaj nomoj
Kaj are rondodancas la svarmo de fantomoj...

Sokrato de Jean Couteaux, fumante sian pipon,
Timtremas, ĉar dumtage revidis li ... Ksantipon !
« *Ne estis ŝi ! – sed tamen portreto tre simila,* »
Al li konsole diras **Barbiero de Sevilla**.

Ifigenio ĉasta kun **Halka** kaj **Karmeno**
Babilas pri sukcesoj ĉe l' Kvara en Dresdeno.

La Prus'a **Faraono** kun ironia rido
Pretendas, ke pli certe ol ŝtona piramido
Eterna polv-tavolo ĉi tie lin protektas,
Ĉar, ke li tie kuŝas... la Angloj ne suspektas !!
Sed jam responde tuis signife kun ekspiro
Makbeto, krima reĝo el lando de Ŝekspiro.

A.- En noteto Ramond Schwartz skribas : Rimarku la riĉecon de la rimoj **ekspiro** – **Sekspiro**,
rim-arko de l'aŭtoro.

Cl.- Sed ni revenu al nia poemo, kiu listigas la esperanto-librojn aĉeteblajn en la Centra Librejo en Parizo en 1924 :

A.- **Hamleto**, la heroo de majstra tragedio,
Sidante tre komforte sur la **Krestomatia**,
Por fine konatiĝi kun sia la aŭtoro
Nun lernas **l'Anglan Lingvon** kaj eĉ **Sen Profesoro!**

Sed ĵus aŭdiĝis voĉo el supraj bret-etaĝoj...
« Ha vi, **Georgo Dandin !** » – El netranĉitaj paĝoj
De paliĝinta libro sopiraj vortoj sonas:
« **Mi** – kvankam kiel **Reĝo de l' Montoj** supre tronas,
Nun sidas **Sub la Neĝo** de l' polvo lastetaĝa
Kaj **En Malliberejo** – (libreto tridekpaĝa)
Tutsola kun **Frenezo** – (du unuaktaj dramoj),
Sopiras al **Misteroj De Amo** miaj flamoj
Kaj lumas jam la **Verdaj Fajreroj** de l' printempo ;
Pretiĝu al **Eliro**, ankoraŭ estas tempo,
Kaj al **Vojaĝ' interne De Mia Ĉambro !** – Certe »

Kaj tiel parolinte **Georg'** simiolerte
Degrimpis de l' supraĵo kaj tra la **Proverbaro**
Alvenis kun **Bukedo** ĉe **Virinet' De Maro**.
Ŝi estis tiu **Marta**, ĉe kiu antaŭ longe
Li gasto estis en la **Kastelo de Prelongo** ;
Krom danko li ankoraŭ al ŝi – pro pruntedono –
Ŝuldadis la **Sentencojn De l' Saĝa Salomono**.
Fatala Ŝuldo, ho ve ! (de Sinjorino Cense)...
« **Ĉu li ?** – **La Avarulo !** » ŝi kriis kaj kompanse,
Post forta **Vangofrapo**, (traduko de Ŝo Saro)
Insultojn serĉis en la **Marista Terminaro**.

... **Batalo De La Vivo ... Mistero De Doloro ...**
Sed li sin senkulpiĝis, almenaŭ pro l' honoro:
« Mi havis **Travivaĵojn** » li iris, « pli ol **Ro Ŝo!**
Min kaptis **la Rabistoj** kaj ve, en mia poŝo
Neniu mono restis, ne eĉ la **Readmono !**
Hontinde trabatita pli ol **Amfitriono**
Sur **Fundo De l' Mizero** mi rampis tra mallumoj
Kaj vagis **Tra La Mondo...** (entute du volumoj !)
En tiuj ĉi **Abismoj** vi estis balzamguto,
Nur vi, **Mirinda Amo**, kaj... **Solo** nur **De Fluto !** »
Tuŝite ŝi pardonis al sia koramanto
Kaj harmonie sonis **l'Interrompita Kanto...**

« **Kiel Ni Plibeligos La Vivon ?** » diris Marta,
« Ho venu nur, » li flustris, « sur bretangul' aparta
Ni kuŝos sur la **Laŭroj**, parolos pri... **Patreco**
En ama ĉirkaŭpreno, en ĉarma feliĉeco !
Ni bone amuziĝos, ĉar tie sur la breto
De longaj jaroj restas leginda volumeto... »

Kaj Marta kaj Georgo, (ĉu nur pro scivolemo?)
Okupis sin ververe pri tre scienca temo

Kun intereso, sen bruaj ekkrioj,
Pri Unu Speco De Kurbaĵ Linioj,
Jen estas la titolo...

Sed lumas jam l'aŭroro,
Silenton ! - Baldaŭ venos, ĉu ne, **La Revizoro !**

Cl.- Aŭskultante tiun ĉi kabaredan skeĉon de Raymond Schwartz, vi certe ekkonsciis, ke la granda plimulto de la klasikaj verkoj, kiuj fakte karakterizas nian literaturon, naskiĝis post 1924. Ili fakte estas infanoj de **Literatura Mondo** en sia plimulto.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012